

Mencioj de Philippe Cullus en Belga Esperantisto

Belga Esperantisto, decembro 1947

ESPERANTA BELGA CENTRA KOMITATO

Laŭ propono de S-ro C. Braet, el Bruĝo, kunsidis, la 22an de Junio pasinta, reprezentantoj de la diversaj Esperanto-Organizajoj en Belgujo. Ili decidis starigi Centran Komitaton, kies ĉefa celo estos reprezenti la Esperanto-Movadon ĉe la oficialaj instancoj.

Dua kunsido okazis la 30an de Novembro. Ĝi elektis provizoran Estraron, kiu tuj ekfunkcios, kaj konsistas el: Prezidanto: D-ro Kempeneers (R. B. L. E.); Vic-Prezidanto: S-ro Cortvriendt (F. L. E.); Sekretario-Kasisto: S-ro Philippe Cullus, 3, Grand'Place, Braine-le-Château (T. J. O.); Estraranoj: S-roj Debaene (Be. L. E.) kaj Van den Eynde (F. U. K. E.).

Belga Esperantisto, majo 1950

Internanda Junularo-Organizo, Belga sekcio, Ĉesperanto: Cullus, 30, rue du Radoux, Braine-le-Château.

Belga Esperantisto, majo 1952

ĈU ESPERANTA KAMPADO EN CHEVILPONT DUM 1952a ?

Multaj gejunuloj, — kaj ankaŭ multaj plenkreskuloj kiuj ilin vizitis — memoras pri la bone sukcesinta esperanta kampada pe-

kaj tiu el ili alprenos de ni la lokon difinitan por Esperanto de antaŭ pli ol duonjarcento; lokon, kiun ĝi meritas de lingva vidpunkto, la sola valoro vere interesa nuntempe.

Mondpacon, homan harmonion, k.e. ni povas defendi en aliaj apartaj grupoj. Por propagando de lingvo, tiuj argumentoj ofte estas maltaŭgaj, aŭ ne sufiĉe efikaj. Tio, kion faru la esperantistoj, por disvastigadi la lingvon, estu *paroli ĝin, ellerni ĝin*; perfektigadi sin en ĝia uzado. Ke en tiaj vicoj estu malpli da *samideanoj* (mi ne ŝatas tiun vorton) kaj pli da kapablaj samlingvanoj. Multaj t. n. *samideanoj* masakras la lingvon: ĉar foje, oni renkontas varmajn apostolojn de Interna Ideo, kiuj, same varme, tute ne scipovas Esperanton.

Ni metu Esperanton je la servo de ĉiu

riodo por gejunuloj, kiu okazis, en la unuaj tagoj de aŭgusto 1951a, en bicno de la Ruĝa Kruc' de Belgujo, apud la ruinoj de la Abatejo de Villers-la-Ville, nomata « La Muelilo de Chevillpont ».

Sub gvidado de la Nacia Komisar'o de la Ruĝa Kruc'-kadetoj kaj de S-ino Jaumotte tiu kampado, kiu okazis en la kadro de pli vasta Ruĝa Kruc'-semajno por kadetoj, iĝis por ĉiuj vere memorinda okazintaĵo.

Kaj la gvidantoj de la T.J.O.-organizaĵo, nome la administranto de Belga Ligo, S-ro Pilloy, kaj la reprezentanto de T.J.O. en Belgujo, S-ro Cullus, havas la nepran deziron iniciati novan kampperiodon dum la somero de 1951a.

Ili antaŭvidas alian formidon, en kiu la eksterlanda reprezentantaro estus multe pli ampleksa ol pasintan jaron, kiam nur F-ino Helmi Veldhuyzen, kiel eksterlandano, ĉeestis la kampon.